PENSEO

N-ro 282

apr. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)



rekupero de pensoj

senpordeco pensojn el fendeto puŝas.
ilin mi rekuperas per fenestroj malfermitaj.
la neeldireblaj estas sunumitaj,
kaj la malsekretaj - en rubujo kuŝas.

2012.11.12 – 4

dependo

nokte la luno en akvo belas
danke al pureco kaj kvieto.
manĝante cindron varman de grandulo,
nanoj kolosiĝas pere de kurteno kaj kriego.



2012.11.13

kontaĝo

rosero stelon ombreske sekvas;
la tago kaj nokto iras sub lupeon.
kuŝante sur la tombo de ŝekspiro,
analfabeto sonĝas sin kiel korifeon.



2012.11.13 - 2

nirvano de papago

paro da papagoj vivis en la kaĝo pure ora.
dancoj, repoj... kaj ne mankis la sceno amora.
la ina fuĝis for por ĉasi la ĉielon;
la vira sidrecitis sutrojn ĝis la morto sendolora.



2012.11.13 - 7

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Kalendaro

Tempo teksas l' estonton
per fadenoj el revo
kaj homo kalendaron
avidan inaŭguras.

Tagoj trilas, kiel kanarioj
en la kaĝoj de l' horoj;
decembroj ebriiĝas
per freŝaj januaroj:
ek al la maro!

Sed kiel scii
ĉu oni vidas
krepuskon
aŭ tagiĝon?

Tiam mi lernis
eltranĉi la mallumon
por l'aŭroron ekvidi
en ĉiu sunsubiro.



Juiz de Fora, 24/12/2014.

Esperanto-klaso

La bruaj drinkejoj festas la someran sabaton per biero kaj futbalo. Estas la 5-a posttagmeze kaj mi ekinstruas Esperanton en esperplena klasĉambro.

Bela sunradio sterniĝas antaŭ la pordo tiel, kiel atenta hundo. Do mi transcendas la limojn de l' entuziasmo kaj mi fordonas min al neesprimebla ĝojo.

Subite mi ektrovas, ke feliĉo estas amlaboro.



Juiz de Fora, 22/02/2015.

La voĉo de la monto

Al Dirce Sales

Per la vortpovo, mi grimpas sur la sanktan monton, kiu pulsas je la ritmo de la koro de la maljuna ŝamano, kiu min alvokas.

Per flugiloj de transcendeco, mi atingas la plej altan punkton kaj akiras la teran forton de la indiĝena saĝulo, kiu meditas envolvita en nuboj.

Inter ĉielo kaj tero ne plu estas limo. Tempo kuŝas sur la lito de l' horoj.

La suno riverencas antaŭ nokto kaj tago. La kvar sezonoj gaje rondodancas ĉirkaŭ ni.

Juz de Fora, 16/02/2015

Cezar (Germanujo)



Legu ankaŭ poemojn!

Vi rapidas, vi hastas.Vi kuras.
Vi faras tion, kion ĉiuj faras?
Kial vi ne legas poemojn?

Forĵetu vian brakhorloĝon.
La poemoj pacience atendas vin,
kelkaj jam dum longa tempo.

Poemoj estas aliaj momentoj.
Poemoj estas bluaj fenestroj
en grizaj pluvemaj tagoj.

Poemoj estas eĥosondiloj
aŭ savringoj por dronantoj.
Poemoj estas buoj kaj turoj.

Poemoj estas miraklokestoj.
Formetu la poemskalpelon
el viaj lernejaj tagoj.

Poemoj ne estas soldatoj,
Legu ilin foje ankaŭ laŭte.
Flustru ilin, deklamu ilin esplore.

Se vi legas poemojn, faru tiel,
kvazaŭ vi sidus en koncerto
de ĉambromuzikistoj.

Legu do poemojn,
forlasu vian maŭzoleon.
Fajfu pri la tielnomata utileco
kaj legu poemojn!

Legu bonajn poemojn, leganto,


sed ne forgesu ĉe tio vin mem.
Legu ankaŭ poemojn.

Semajno de laborbestulo


Tag' lundo estas aĉa tag',
sentiĝas ĝi laŭ rusto;
kaj mardo estas servotag',
do ne laŭ mia gusto.

Merkredo estas same plag'
kaj jaŭd' eĉ pli malplaĉe
kaj, se ne estus do vendred',
mi malsaniĝus aĉe.

Sabato estas dormotag',
do pli laŭ homa hundo.
Kaj se alvenis la dimanĉ',
minacas min jam lundo.



Paŭlo Silas (Brazilo)



SUR ŜTONO, RAŬPECAJ VORTOJ

Disde ĉiuj landolimoj difinitaj
Oni kuris kaŝintence,
Sed kliniĝis riverence
Sokle de statu' de nobla homkvalit' kaj

Multe da promesoj skribis sur granitaj
Homfiguroj, eĉ se dense
Fluis la real' elpense.
Jen promes' sur ŝton', moraldev' sen
hezit-rajt'.

Kiu sekvos la mesaĝon gravuritan?
Tiu, kiu ĝin gravuris, malkomprenas
Formon, kiu vestas ujon krizalidan.
Raŭp' en voj' linia sin mem daŭre tenas.
Tial planon nur promesu ĝustatempe.
Mola raŭpo sin restigu plu surventre.

MALBONFARTAS

Mil radoj cirkloiras en grandspaca cerbo.
Tri hormontrilojn mastras ŝtonepokaj vivoj.
Senŝeligil' malakra pro larmveka cepo.
Kaj kial naŭzkaŭzante serpentumas vi, voj'?

Fornfaŭkoj malfermiĝas por engluti febrojn.
Ĉu povas decidhore, lastminute, eroj
En perdon kuntiriĝi ĉirkaŭ fandopunktoj?
Al mort' proksimiĝanta la vivoportun' troi?

Sciig' elglitas el sub marplanktona planko.
Pasio konfuziĝas en la malvarmsango.
La akvofluo-forto fanatikigas saĝon.

Rideto hieneca: ĉu indikas plaĉon?
Blankarda sceptropinto vundmakulas belon.
Malsato sociuma. Nutraĵplena kelo.



Mori (Usono)



Mi estas Charlie

Je la momento de teroro,
granda ŝoko kaj hororo,
kiam l' sango de senpekuloj
Charlie kaj liaj kolegoj
akvumis la arbon de liber'
Li renaskiĝis sur la ter'

Je suis Charlie
Mi estas Charlie,
I am Charlie,
Man Charlie Hastam, ...
Mi estas Charlie, Vi estas Charlie,
li estas Charlie, ŝi estas Charlie,
Ho, malamikoj de liber' ,
jen vidu propraokule,
la arbo de libereco
jam tre fortas, jam tre fortas
la arbo de libereco
neniam mortas, neniam mortas
Mi estas Charlie,
Ni estas Charlie,
Ĉiuj amantoj de liber'
nun estas Charlie sur la ter'.

Poem-akuŝo

Miaj poemoj
ne estas vortoj
el mia buŝo
sed la larmogutoj de kortuŝo
kiam la anĝelo de ĝojo
karesas mian koron,
aŭ la febro de amo
kuras tra mia brulanta korpo
aŭ la Monstro de doloro
sidante sur mia koro
plenforte premas mian gorĝon,
ĝis senkonsciiĝo,
tiam, lastamomente
en mia koro
okazas la poemakuŝo!

Socia animalo

Homo estas
socia animalo,
li povas murdi homojn
en bataloj
kaj poste danci
en la danco- haloj!
Homo kapablas
mortigi civitanojn
per la militaj bomboj
poste meti florojn
sur la viktimaj tomboj
Homo kapablas esti
elokventa oratoro
pri amo, paco,
humanisma valoro
kaj esti ja
kruela diktatoro!
Homo povas paroli
favore al moralo,
Kaj persekuti homojn
pro politika kialo!
Homo kapablas esti
en sekreta batalo
kontraŭ sia frato
kiel ĵaluza rivalo!
Homo povas vivteni
Sin kiel vulpoj kaj lupoj,
poste en la preĝejo
preĝi pro siaj kulpoj!
***
Homo ja estas
socia animalo
vivanta en la urbo;
La moderna ĝangalo!

Ŭel Roŝa (Brazilo)



Preĝ' al printemp'

Estas ĝuo povi revidi vin,
tio igas min repensi min,
sen preta difin',
sed kun senmezure am' sen fin'.

Vi ravas, vin mi volas,
neniam gravas se vi min kontrolas,
kun vi anstataŭ ŝtoni mi molas,
kaj senhezite ame ĝismedolas.

Mian domon vi eniras,

ĉion nova mi deziras,
perlojn diras,
kaj jen amo min inspiras.

Tiel estas vi al mi printemp', al vi mi estas!
Ĉiujn naturajn minutojn ni mute festas!
La magion esti vivaj ni fund-atestas!
Nu ni sur nin mem simple investas...



Transsonĝo

Steleton iam promene
mi trovis laŭ mia voj'.
Ĝi mirindbrilis sintene
feliĉside apud roj'.

Ĉu el ĉielo ĝi venis,
mi scivolis kun pensem'.
Post permes' de ĝi ĝin prenis,
fragilan! Ni du kun trem'.

Al mia brust' ĝin do time
proksimigis kun tener'.
Ĉe la kor' ĝi ŝajnis ŝirme,
ni ekiris tra la ter'...

Vitor Mendes (Brazilo)



Denove

(kantteksto)

Estis vi...
Mia granda amkazo
La brakumo-ekstazo
Ĉiam en la memor'

Estis vi...
Plej komplika afero
Kaj tamen plej simpla
Ene de mia kor'

Estis vi
Mia bona eraro
Historio plej stranga
De freneza verkist'

Kaj pro tio kaj io
Ke min memorigas
Resopir'
Denove pri ĉio...

Estis vi...
La mensogo sincera
Iluzio plej vera
Vivita de mi

Estis vi...
Amrilat' plej malnova
Amikeco plej kora
De mia anim'

De l' memoroj
De mia vivad'
Estas vi resopiro
Plej kara al mi
Tial ĉi
Jen mi sentas denove
Vin proksima de mi

Jen forges'
Je forgeso pri vi
Jen dezir'
Vin deziri ja pli
Jen decid'
Por memori pri vi
Dum ajna momento
Kun tuta trankvil'

Ha...
Estis vi
La feliĉa alveno
Estis vi la malbeno
Kiu nur benis min
Estis vi

Mia plej bona vojo
Kaj erar' kaj malĝojo
Faritaj de mi

El memoroj de mia vivad'
Estas vi resopiro
La plej granda am'
Tial ĉi
Jen mi sentas denove
Vin proksima de mi



Siv Burell (Svedujo)



Kiu loĝis en la griza dom'?

Kiu loĝis en la griza dom'?
Ĉu solulo kun sia vertag',
ĉu alta maristo velinta de Rom',
ĉu salmovendanta virino de Prag',
ĉu poeto skribanta
aŭ aŭstronomo direktanta
sian teleskopo al Marso
ĉu narkotulo vendanta drogojn,
ĉu vagemulo evitanta blovojn,
ĉu maljunulino
serĉanta berojn,
ĉu verkisto serĉanta verojn,
pensante, ke malvasta la propra dom',
ĉu pentristo, kiu trovi,
ke pli bonas eskapi el ĉiu hom'?



pentraĵo de la aŭtorino

Ne, estas iu kiu havas alergion
kontraŭ elektronikon
kaj uzas sian energion
ĉe propra fajrejo
en sovaĝejo,
kuraci sian korpon,
plibonigi sian staton.
Bonŝancon en la evitado—
Via propra Vasakurado.

Ali Podrimja (1942-2013)





mia Dio pli junas ol mi
li kapablas ĝoji
malĝoji
kiam mi mortas kiam mi naskiĝas
mia Dio havas siajn kolorojn
sonĝojn
dezirojn li kapablas
ami
malami
sed ne morti
hazarde mi kreis lin
mia Dio pli aĝas ol mi iun tagon
mi levos manon kontraŭ li
diablo malbenita

La sozio

Mi levas glavon
la maron li disfendas
semas sunflorojn
priflaras
vekas vipuron

mi kantas
li liberigas min de la nenieco
de silento
poste alportas por mi

la pafilon de mia Patro

en mi estas morta blindulo
kiu havas naŭdek naŭ jarojn
nekonata voĉo
kiel mi liberigu vin
de la sombreco de sonĝoj
de surda kampanilo

Balado pri homo

mi konas homon
li migras nuda tra la mondo

anstataŭ kravato
vipuron li nodas sur la kolo

anstataŭ ĉemizo
lupan haŭton li surmetas

dum la tuta tago
li senvestiĝas kaj vestas sin

meze de placo

neniu lin rigardas
kaj li migras nuda tra la mondo

Homo, kiu perdis ĉion
sentojn
okulojn

La nigra kato

dum migrado
la nigra kato akompanas min

mia animo diras al mi
vi haltos vojomeze

la kanto diras al mi
neniam vi kantos laŭte

lumo diras al mi
blindulo estos blinda

sonĝo diras al mi
serĉadu min en realo

almenaŭ unu vorton diru al mi
ĉar mi ne scias kiun ami kaj kiun malami

iru kaj kredu la vizaĝon en la spegulo

dum migrado
la nigra kato akompanas min

la horon de mia destino ĝi decidos

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUA

La egaleco de ĉiuj estaĵoj

§02-09

La scioj de la antikvuloj estis perfektaj. Kie do kuŝis tia perfekteco? Komence ili ankoraŭ ne sciis, ke ekzistas estaĵoj. — Tio estas la plej perfektaj scioj; tiel perfektaj, ke nenio povas esti aldonita. Poste ili sciis, ke ekzistas estaĵoj, sed ili ne faris distingojn inter ili. Pli poste ili faris distingojn inter ili, sed konis ankoraŭ neniajn distingojn inter la pravo kaj la malpravo. Kiam aperis klara distingo inter la pravo kaj la malpravo, la Taŭo estis detruita. Kiam la Taŭo estis detruita, estiĝis individuaj preferoj kaj antaŭjuĝoj.

Ĉu efektive ekzistas konstruo kaj detruo? Ĉu efektive ne ekzistas konstruo, nek detruo? Ke ekzistas konstruo kaj detruo, tio similas al

la fakto, ke la muzikisto Zhao Wen ludis la liuton. Ke ne ekzistas konstruo nek detruo, tio similas al la fakto, ke Zhao Wen ne ludis la liuton.

Siatempe Zhao Wen ludis la liuton. Shi Kuang batis la takton svingante la bastonon. Huizi argumentis, sin apogante kontraŭ *vutong*-arbo (Firmiana simplex). La scioj de ĉiu el la tri majstroj en sia arto estis preskaŭ perfektaj, kaj pro tio ĉiu ĝuis grandan popularecon ĝis la fino de sia vivo.

Ĉar ĉiu el ili eminentis en sia arto, ili rigardis sin distingindaj inter aliaj; ĉar ĉiu el ili amis sian arton, ili deziris komprenigi ĝin al aliaj. Sed oni ne volis, nek kapablis, kompreni iliajn artojn, kaj tial Huizi mortis kun la malfacile komprenebla diskuto pri "malmoleco kaj blankeco". La filo de Zhao Wen daŭrigis ludi sur la kordo de sia patro, kaj mortis kun nenia atingo. Se tiuj ĉi tri majstroj povas esti konsiderataj kiel sukceson atingintaj, eĉ mi povas esti konsiderata kiel tia, kvankam mi atingis nenian sukceson. Se tiuj ĉi tri majstroj povas esti konsiderataj kiel nenian sukceson atingintaj, tiam nek mi, nek iu ajn alia povas atingi ian sukceson. Tial tiaj konfuzivaj argumentoj estas malŝatataj de la saĝulo kaj, anstataŭ fari distingojn inter estaĵoj, la saĝulo sekvas la komunan naturon de la estaĵoj. Tio estas nomata la uzado de la lumoj de la racio.

§02-10

Nun mi havas ion por diri. Mi ne scias, ĉu tio, kion mi diros, estos de la sama karaktero kiel tio, kion aliaj diros. Iasence tio, kion mi diros, ne estos de la sama karaktero; alisence tio, kion mi diros, estos de la sama karaktero, kaj tial estos nenia diferenco inter tio, kion mi diros, kaj tio, kion aliaj diros.

Sed, kvankam povas esti tiel, tamen permesu al mi min iom esprimi. Estas komenco, estas nekomenco, kaj estas ne-nekomenco. Estas ekzisto, estas neekzisto, estas ne-neekzisto, kaj estas ne-ne-neekzisto. Se subite ekestas diferenco inter ekzisto kaj neekzisto, eĉ tiam, inter la ekzisto kaj la neekzisto, mi tamen ne scias, kiu efektive estas la ekzisto kaj kiu efektive estas la neekzisto.

Nun mi jam ion diris, sed mi ne scias, ĉu tio, kion mi diris, efektive estas io dirita aŭ io ne dirita. En la mondo estas nenio pli granda, ol la pinto de aŭtuna hareto, dum la monto Tai estas malgranda; kaj estas neniu pli longviva, ol infano fruaĝe mortinta, dum Peng Zu, kiu vivis pli ol sepcent jarojn, mortis juna. La ĉielo kaj la tero ekestis kune kun mi; kaj ĉio en la mondo kaj mi estas unu tutaĵo. Ĉar ĉio estas unu tutaĵo, ĉu do necesas ia parolo? Sed ĉar mi jam diris, ke ĉio en la mondo estas unu tutaĵo, ĉu do tio ne estas jam parolo? La unu plus la parolo faras du; du plus unu faras tri. Se tio daŭras plu, eĉ la plej lerta kalkulanto ne povas atingi la finon, por ne paroli pri la ordinaraj homoj! Se, procedante de nenio al io, ni povas jam atingi tri, kiom multe pli ni povos atingi, se ni procedas de io al io! Nu, ne procedu plu, sed nur sekvu la naturan vojon de la aferoj.

§02-11

La Taŭo toleras nenian distingon. La parolo havas nenian konstantan kriterion. Kaj tial, koncerne la parolon, ekzistas "limdifinoj". Permesu al mi diri ion pri la "limdifinoj". Estas la maldekstro kaj la dekstro, la ordoj kaj la klasigoj, la dividoj kaj la argumentoj, la diskutoj kaj la disputoj. Tiuj ĉi estas nomataj Ok Atributoj. Pri tio, kio estas ekster tiu ĉi mondo, la saĝuloj ne diskutas, kvankam ili ne neas ĝian ekzistadon. Pri tio, kio estas en tiu ĉi mondo, la saĝuloj diskutas, sed ne faras juĝojn. Pri la kronikoj de la antikvaj reĝoj, la saĝuloj faras juĝojn, sed ne argumentas. Kiam estas divido, estas io ne dividita. Kiam estas argumento, estas io, kion la argumento ne atingas. Kion tio signifas? La saĝuloj tenas

ĉion en sia menso, dum ordinaraj homoj argumentas pri aferoj por konvinki unu alian. Tial oni diras ke, kiam estas argumento, estas io, kion la argumento ne vidas.

La granda Taŭo ne povas esti nomata, nek priparolata. La granda argumento ne bezonas vortojn. La granda bonkoreco ne estas kompatema. La granda konsciencpureco ne estas modesta. La granda kuraĝo ne montras sin fortega. La Taŭo, kiu sin esprimas, ne estas la Taŭo. La parolo, kiu argumentas, ne atingas sian celon. La bonkoreco, kiu uziĝas konstante, ne estas persista. La konsciencpureco, se publike konfesita, renkontas nekredon. La kuraĝo, kiu estas elmontrita, devas per si mem malsukcesi. Ĉi tiuj kvin, por tiel diri, estas rondaj, tamen ili inklinas kvadratiĝi.

Sekve tiu, kiu scias halti ĉe tio, kion li ne scias, estas perfekta. Kiu do scias la argumentadon, kiu bezonas neniajn vortojn, kaj la Taŭon, kiu estas neesprimebla? Se iu ilin scias, li povas esti nomata Konservejo de la Naturo. Tiu konservejo, kiam aĵoj estas metitaj en ĝin, neniam estas plena, kaj, kiam aĵoj estas elprenitaj, neniam estas malplena. Kaj tamen oni neniam scias, kial ĝi estas tia, kaj sekve ĝi estas nomata “kaŝita lumo”.



Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Vana atendo

ĉina antikva fablo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Antaŭe
vivis kampulo
avarema kaj pigra,
lerta en menskalkulo,
sed vera mulo.

En kampo
lia jen dika
arbo staris impone,
kun branĉaro fortika
kaj frukt’ persika.

Leporo
kuris rapide
kontraŭ la arba trunko
rompis kolon rigide
kaj mortis fride.

La kampul’
gajnis senpene
la leporon kun ĝojo
kiu jen senkatene
ŝprucis plenplene.

De tiam
li jen demetis
ilojn por kamplaboro
kaj preĝe dion petis
atendi pretis


ke lepor’
mortos alia

pro frapo kontraŭ l' arbo.
La ulo senracia
agis senscia

tiel ĝis
kampo sovaĝa
fariĝis, velkis plantoj.
Ba! la homo malsaĝa
kun sonĝ' miraĝa!



Jadranka Miric (Serbujo)



Gaja printempa festo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Ĉi jaro
estas la ĉina
printempa ŝafojaro.
Brilo de urbo pekina
sur arbo pina.

Feliĉo,
ĝojo surstrate
vivaj muzikaj bandoj.
Oni dancas korbate
ritmon laŭdate.

Ruĝiĝas
flirtantaj flagoj.
Koloroj favorataj.
Ban Ki-Moon-a reago
al "festo-ago".

La drakoj
multkoloritaj
vigle ondiĝas sub
balonoj plenigitaj
kaj kunligitaj.

Nova jar',
printempa festo
diskonigas kulturon.
Elpelita el la kesto
"ŝafa tempesto".

Al miaj ĉinaj geamikoj elkorajn bondeziroj el Serbio PROGRESON KAJ PACON EN LA KURANTA 2015 JARO —LA JARO DE ŜAFO.

Homoj vekiĝu, donu ŝancon al paco!

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Perdita
generacio.
Ĉu eblas tio? Ĉio
dependas de racio,
kaj mem konscio.

Ĉi vintra
sezon' mortonta.
Agonias popolo.
Ve, krizo ne solvonta.
Paco songonta.

Sindono.
Ve, solidarec'.
Kredo en vivobelec'.
Homa ‚sankta liberec'
Homa amikec'.

Pistola
demokratio.
Faŝisma sintrompado,
longdaŭra apatio.
Pigra opio.

Degrado
de homaj rajtoj.
Debuto de novuloj.
Refrakasas debatoj.
Krioj de pentoj.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

M. Zoŝĉenko (1894-1958)

Rakonto pri unu profitema laktistino

Unu loĝantino de la urbo Simferopolj, la dentistino O., la vidvino laŭ deveno, decidis edziniĝi.

Nu en nuna tempo oni edziniĝi ne simple. Des pli se sinjorino estas inteligenta, kaj ŝi volas vidi ĉirkaŭ si ankaŭ inteligentan, akordan kun ŝi personon.

En nia, tiel diri, proleta lando problemo pri inteligencianoj estas problemo sufiĉe streĉita. Problemon de etato oni ankoraŭ ne solvis definite. Kaj tie, mi pardonpetas, fianĉoj. Klara afero, ke inteligentaj fianĉoj nun estas ne multe. Ili certe estas, sed ĉiuj ili iaj tiaj: aŭ ili jam estas edziĝinta, aŭ ili jam havas du-tri familion, aŭ ĝenerale ili malsanas, kio certe estas malbone por geedza vivo.

Kaj jen dum tiu situacio loĝas en Simferopolj unu vidvino, kiu en pasinta jaro perdis sian edzon. Li ĉe ŝi mortis pro tuberkulozo.

Jen do mortis ĉe ŝi edzo. Ŝi komence verŝajne facile rilatis pri tiu evento. “Aha – ŝi pensas – Bagatelo!” Sed poste ŝi vidis – tio estas tute ne bagatelo. Fianĉoj ne iras kiel amaso. Kaj ŝi certe malĝojis. Kaj jen do ŝi malĝojas dum proksimume jaro kaj rakontas pri sia malfeliĉo al laktistino. Al ŝi frekventis laktistino, la laktistino alportis lakton. Ĉar ŝia edzo mortis pro tuberkulozo, ŝi komencis zorgi pri si intense nutriĝinte. Ŝi trinkis lakton po du litroj dum tago. Kaj pro tiu nutrado ŝi eksplicite ekpufiĝis kaj havis sanon tre bonegan. Kaj verŝajne pro tio al ŝi komencis veni en kapon diversaj facilaj, aeraj pensoj pri edzeco. Kaj jen do ŝi trinkas lakton dum proksimume jaro, pli multe dikiĝas kaj interalie havas virinan filistran interparolon kun sia laktistino.

Nekonate, kiel komenciĝis ilia interparolo. Verŝajne ŝi venis en kuirejo, kaj ili ekinterparolis. Jen onidire produktoj de nutro plikariĝas. Lakto laŭdire estas pli likva, kaj ĝenerale fianĉoj ne estas.

Laktistino parolas:

– Jes, senkondiĉe ili estas ne multe.

Dentistino parolas:

– Mi perlaboras bone. Mi havas ĉion: loĝejon, meblaron, monon! Kaj mem mi – ŝi parolas – estas ne malbelulino. Sed jen mi proprasence ne povas duafoje edziniĝi. Mi estas preskaŭ preta presi anoncon en gazeto!

Laktistino parolas:

– Nu gazeto estas ne afero. Sed ion oni certe devas elpensi.

Dentistino respondas:

– Limokaze mi ne avarus monon. Mi donus al tiu, kiu konatigos min por edziĝo.

Laktistino demandas:

– Ĉu multe monon vi donos?

– Jes – parolas dentistino – depende de tio, kia homo troviĝos. Se certe li estas inteligenciano kaj edziĝos, do mi donus tridek rublojn sen bedaŭro.

Laktistino parolas:

– Tridek rubloj estas malmulte. Se vi donos al mi kvindek rublojn, do mi okazigos tiun aferon. Mi havas je rimarko konvenan homon.

– Sed eble li ne estas inteligenciano – dentistino parolas – Ĉu eble li estas hoka? Pro kio mi donos kvindek rublojn?

– Ne – laktistino parolas – li ne estas hoka. Li estas tre inteligenta. Li estas muntisto.

Dentistino parolas:

– Do vi konatigu min. Jen mi anticipe donas al vi dek rublojn.

Kaj jen tiel ili adiaŭas.

Oni devas diri, ke laktistino ne havis je

rimarko ion krom sia propra edzo.

Sed granda mono tuŝis ŝin, kaj ŝi komencis pensi en sia cerbo, kiel ŝi povas pli simple preni monon de tiu dentistino.

Kaj jen ŝi venas en hejmon kaj parolas al sia edzo:

− Jen, Nikolao, kio rezultas. Ni povas preni kvindek rublojn nenial sen grandaj klopodoj kaj emocioj.

Kaj do ŝi rakontas al li esencon de afero. Ŝi proponas: ŝi intence konatigos lin kun tiu pliriĉiĝinta dentistino, kaj la dentistino laŭ malsaĝo donos al ŝi kvindek rublojn.

− Kaj – ŝi parolas – limokaze se ŝi persistos, li povas registri geedziĝon. En nuna tempo tio estas simple. Hodiaŭ li registras geedziĝon, sed morgaŭ aŭ postmorgaŭ li returnos!

Edzo de tiu laktistino, la sufiĉe bela viro kun lipharoj, tiel parolas al ŝi:

− Tre bone. Bonege! Mi ĉiam ĝojas preni kvindek rublojn nenial. Aliaj homoj por tia mono laboras dum monato, sed tio estas tia bagatelo – registri geedziĝon!

Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Kaj jen do post du tago laktonisto konatigas sian edzon kun dentistino.

Dentistino kore ĝojas kaj pagas monon sen superfluaj vortoj kaj veoj al laktonisto.

Nun rezultas tia situacio.

Edzo de laktistino, la fama blaganto kun lipharoj, urĝe registras geedziĝon kun dentistino, translokiĝas al ŝia apartamento kaj dume loĝas tie.

Tiel li loĝas dum kvin tagoj, poste dum semajno, poste dum dek tagoj.

Tiam venas laktistino.

− Mi ne komprenas – ŝi parolas – Kio okazas?

Muntisto parolas:

− Ne, mi decidis ne reveni. Por mi ĉi tie vivo rezultas ia pli interesa.

Tuj vere li ricevis vangofrapon pro sia malbela konduto, sed li ne ŝanĝis sian opinion. Tiel li restis loĝi en hejmo de dentistino. Dentistino, kiam ŝi eksciis pri ĉio, tre ridegis kaj diris, ke ĉar ne estas perforto, sed estas libera elekto, do incidento finiĝis.

Vere laktistino ankoraŭ du foje venis al loĝejo kaj malkulture skandalis postulante redonon de sia edzo, tamen nenio bona rezultis. Pli multe tio – ili rifuzis esti ŝiaj klientoj, ordonis plu ne alporti lakton por evito de pluaj skandaloj kaj dramoj.

Tiel por kvindek rubloj avara kaj profitema laktonisto perdis sian belan, inteligentan edzon.

* *Miĥail Miĥajloviĉ Zoŝĉenko estas fama sovetia verkisto-satiristo.*

Esperantigis

Igorj Ĥomjakov

(Rusujo)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo

de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,

Chongqing, 400020, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ

http://gazetejo.org/eo/penseo

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_